# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

merkredon, la 1-an de Julio, 2015 • numero du


## Hodiaŭ • Today



★ **8:30 – 9:30 atm**
Grupa kunsido / Group meeting:
*Flowe Building, ĉambro #110*

★ **9:30 atm – tagmezo**
Lecionoj / Classes
*Flowe, unua etaĝo*

★ **2:00 – 3:15 ptm**
Ĵenja Bondelid prezentos enkondukon al KTF
*Flowe, unua etaĝo*

★ **7:00 – 8:00 ptm**
Film-reĝisoro Christopher Mihm prelegos (en la angla) pri siaj spertoj en la farado kaj reklamado de filmoj kiel *Atako de la lunaj zombioj* kaj *Domo de fantomoj.* Ambaŭ estas dublitaj en Esperanto.

★ **8:00 – 9:00 ptm**
Ni kunvenos kun Christopher Mihm en la trinkejo *Tyler's Tap Room*, kiu situas trans la strato de nia loĝejo (strato *Halifax*).

★ **9:00 – 10:30 ptm**
*Danny Johnson Saves the World* (filmo de Christopher Mihm) dublita en Esperanto
*Flowe 110*

# Konsiloj por novaj NASK-anoj

*Lee Miller ("Liĉjo") estas multjara veterano kaj organizanto de NASK. Li jam laboris kiel redaktisto, helpinstruisto kaj poste instruisto. Ĉi-jare li instruas en la meznivela kurso.*

Ni tiom ŝatas, ke vi decidis partopreni la ĉi-someran Esperanto-kursaron en Raleigh. Ni entute havas 57 lernantojn – tio estas tre granda grupo, kaj ni spertos veran Esperanto-komunumon dum la ok tagoj ĉe William Peace University! Estas vi, kiuj kreas la sperton per via ĉeesto. Sen niaj lernantoj, ne estus NASK.

NASK vere estas mallonga… vi ne kredos, kiom rapide pasos la 8 tagoj. Kaj vi donis monon, tempon, kaj energion por esti ĉi tie. Tial mi diras, kiel mi diras ĉiujare: Parolu Esperanton, ne vian denaskan lingvon. Nur ĉi tie (en Usono) vi povas uzi Esperanton ĉiutage dum pli ol semajno. Vi ne volas perdi la okazon vere progresi en via lingvokapablo. Se vi ne scias kiel diri ion, petu helpon – ĉirkaŭ vi estas multe da parolantoj kiuj volonte helpos. Se vi ne estas tre kapabla en Esperanto, uzu la frazojn "Mi bezonas helpon", "Kiel oni diras ____ en Esperanto?", "Kio estas la vorto por _____ en Esperanto?", ktp.

LA PLEJ GRAVA AFERO ĈE NASK ESTAS ***PAROLI ESPERANTON!***

Ne estas ia "Esperanto-polico" kiu punos vin, se vi ne parolas Esperanton. Sed estas tute eble ke viaj instruistoj diros "Ho, ĉu mi aŭdas la hispanan?" aŭ "Ha, ĉu vi parolas angle?" kaj proponos ke vi parolu Esperanton… Kaj ne silentu pro timo ke vi ne parolos perfekte bone. Jen sekreto: Neniu el ni parolas perfekte bone.



LA PLEJ GRAVA AFERO ĈE NASK ESTAS ***PAROLI ESPERANTON!***

Se vi havas problemon, aŭ ne kontentas pri io, tuj turnu vin al iu membro de la teamo. Ni volas ke vi ĝuu viajn tagojn ĉi tie, meze de multe da laboro kaj lernado, kaj ni faros ĉion eblan por kontentigi vin (kompreneble, ne ĉio estas ebla). Se ni ne konscias pri problemo, ni ne povas helpi solvi ĝin.

LA PLEJ GRAVA AFERO ĈE NASK ESTAS ***PAROLI ESPERANTON!***

Ek, do, al la lecionoj kaj programeroj kaj ekskursoj kaj konversacioj en la ĉambroj kaj koridoroj de WPU, kaj en la stratoj de Raleigh.

Kaj ĉu mi hazarde jam menciis ke LA PLEJ GRAVA AFERO ĈE NASK ESTAS ***PAROLI ESPERANTON?***

Amike,
Lee Miller (Liĉjo)

# Saluto de la NASK-administranto



*Ĉiujare Ellen Eddy senlace prizorgas planojn por la venonta kursaro, kaj ŝi estas la ĉefa motoro de NASK. Kvankam la kursaro daŭras nur kelkajn tagojn, ŝia laboro estas tutjara!*

Saluton NASK-anoj kaj KTF-anoj, mi esperas ke vi alvenis al la Universitato William Peace senprobleme. Mi estas la administranto de NASK, kaj mi provis faciligi vian alvenon kaj restadon ĉi-tie. Ofte estas etaj problemoj je la komenco, kiujn ni povos solvi se vi sciigos min. Mi loĝas en ĉambro n-ro 107, do frapu aŭ lasu mesaĝon sur la pordo. Vi ankaŭ povas telefoni min ĉe 206-300-9724. Mi esperas ke ĉio iros glate, kaj ke vi ĝuos vian partoprenon en ambaŭ programoj.


**La NASKa Fasko**
**Redaktejo: Finley 112**
<nask.esperanto@gmail.com>


La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:
<nask.esperanto@gmail.com>

# Bonvenigas vin la KTF-organizantoj

*Ĉi-jare ni bonŝancas enplekti la novan Kino-Teatro-Festivalon en nian NASK-programon. Organizas ĝin Karlo MAYS (maldekstre), Ĵenja BONDELID (meze), kaj Derek ROFF (dekstre). Derek verkis la jenan bonvenigan mesaĝon antaŭ semajno, kiam oni ankoraŭ planis la diversajn programerojn.*







Post ses tagoj, la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj Kino-Teatro-Festivalo (KTF) komenciĝos. Ni antaŭĝuas renkonti vin, ĉiujn en Raleigh. Por KTF, la organiza teamo nun finpreparas multajn detalojn de la programo. Ni feliĉas anonci ke en la unua nokto, filmfaranto/reĝisoro/verkisto Christopher MIHM prezentos al ni (kaj al loka publiko) pri siaj multaj filmoj. Pluraj el tiuj havas elekton de dialogo kaj subtitoloj en Esperanto. Fine de la vespero, Chis montros sian plej lastan filmon, *Danny Johnson Saves the World.*


Ni ankaŭ finpretigas la filmotan scenaron, kiun verkis Tim WESTOVER. Dum KTF, ni faros ĉiujn el la diversaj, necesaj taskoj, kaj tiel kune kreos kvin-minutan video-rakonton. El nia grupo, ni elektos la geaktorojn, ni filmos, registros la sonon, kaj redaktos ĉion. Se vi havas specialan intereson pri iuj el tiuj taskoj, bonvolu informi nin tuj. Ene de nia grupo ni trovos ĉiujn necesajn kapablojn, rolulojn, kaj farantojn, ĉu ne?

Ni antaŭĝuas nian tempon kune kun vi, kaj la kuna kreado kaj lernado de KTF.

— Karlo, Ĵenja, kaj Derek

# Kiel trovi la trinkejon *Tyler's Tap Room*?

Je la 8-a horo vespere, post la prelego de Christopher MIHM, ni promenos al la proksima trinkejo *Tyler's Tap Room.* Iru de nia loĝejo (*Finley*) trans la straton (*Halifax*). Vi vidos la trinkejon dekstre.




# *Paŭlo salutas*

*La superan kurson ĉi-jare instruas nia amata eminentulo el Britujo, Paŭlo GUBBINS.*



Bonvenon al la supera kurso!


Mi tre antaŭĝuas kunlabori kaj kunlerni kun vi… dum longa instruista kariero mi estas konvinkita, ke mi lernas pli de miaj studentoj ol inverse.

Do kune ni esploros diversajn erojn el la literaturo de Esperanto kaj konatiĝos kun aŭtoroj verŝajne relative bone konataj kaj ankaŭ kun kelkaj malpli konataj. Sed ne sole pri literaturaĵoj temos. Ni sublupeigos aliajn tekstojn kaj de enhava kaj de lingva vidpunktoj… kaj ilin kune diskutos.

Efektive la celo de la kurso estas paroliga: ĉiuj tekstoj, ĉu literaturaj perloj, ĉu ĵurnalismaj ĉiutagaĵoj, servas kiel hokoj, sur kiujn pendigi diskutojn, debatojn, konversaciojn aŭ simple babiladon.

Do liberigu la langojn … kaj ĝuu!

# Verku por la *Fasko*!



## (aŭ fotu, anoncu, leteru… )

La *Fasko* estas forumo por **vi**, kie vi povas ekzerci vin en verkado kaj dividi interesajn temojn kun aliaj lernantoj. Ni bonvenigas artikolojn pri viaj ŝatokupoj, viajn poeziaĵojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn al la redaktoro (aŭ eĉ am-leterojn al la redaktoro)… ktp.

Portu kontribuaĵojn al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al **<nask.esperanto@gmail.com>**.

**Kaj… se vi estas en la supera kurso**, ni kuraĝigas vin helpi al lernantoj en aliaj niveloj verki aŭ poluri siajn verkojn. Se vi pretas proponi vin kiel volontulon, bonvolu tuj sciigi tion al Hoss, kaj li peros tiun informon al tiuj, kiuj serĉas helpon. Dankon!